SCIENCA REVUO, vol. 32 (1981), n-ro 2 (138)

# Amo, geedziĝoj kaj politiko de princino en la 17-a jarcento

*Clelia Conterno Guglielminetti* (Italio)*

Mi estis forlasinta, la antaŭan vesperon, Ĉeĥoslovakion, grizan, kvazaŭ senkolorigitan de la pluvo, kiu jam dum pluraj tagoj insistadis super la malhelaj palacoj de Prago kaj super la malhelaj pinarbaroj de Bohemio. Kaj mi vekiĝis en hela oktobra mateno, kiam la vagonaro estis transpasinta la limon jam de multaj horoj: mi vekiĝis en Pollando.

Scivole, eble eĉ iom timeme, mi alrigardis ĝin, la teron, kiu devis gastigi min dum monatoj. Tiam mi estis tre juna, kaj mia celo estis kolektado de dokumentoj por verki mian tezon por universitata doktoriĝo. Mi estis juna, kaj tute ne imagis tion, kio atendis en la estonto la teron tiel dolĉe ondumantan antaŭ mia rigardo. Estis paca tempo kaj paca mateno: pale lazura ĉielo, kiu nuanciĝis ore ĉe la oriento, malmultaj grupoj de arboj, kie la randoj de la kulturitaj kampoj kruciĝis, ruĝaj vivecaj kaj trankvilaj ruĝoj, oroj flave ardaj kaj brunaj oroj. Tia aperis al mi la lando en sia «*złota jesień*», ora aŭtuno.

Ĝi aspektis alia, certe, al la ne plu tute juna princino *Marie Louise Gonzaga de Nevers*, kiam ŝi alvenis al ĝi en la lastaj tagoj de la jaro 1645, kun riĉa parado de sledoj glitantaj sur neĝo.

Ŝi venis el Francio por atingi sian edzon, la reĝon de Pollando Ladislao la Kvara, al kiu ŝi estis edziniĝinta per prokuro la 5-an de novembro 1645, en Parizo. Tiu geedziĝo fermis por ĉiam la sentimentan vivon de la 34-jara virino, ĝis tiam unu el la plej belaj kaj plej diskutataj princinoj en la kortego de Ludoviko la Dektria kaj en tiu de la, tiam, kelkjara reĝeto Ludoviko la Dekkvara (la estonta Reĝo-Suno). Ekde sia geedziĝo kun la dika, podagra pola reĝo, ŝi estos nur reĝino. For la frenezaĵoj kaj la amoj de la junaj jaroj,

* Profesorino pri itala lingvo kaj literaturo, *Viale XXV Aprile 151, I-10133 Torino.*

**scienca revuo**

**volumo 32 (1981)**

**oficiala organo de**
**internacia scienca asocio esperantista**
**(isae)**

**Pizo (Italujo), 1981**

## Landaj delegitoj de ISAE:

| | |
|---|---|
| **Argentino** | *Máximo Valentinuzzi, Gascón 520, RA-1181 Buenos Aires* |
| **Aŭstralio** | *K. McG. Bowling, 42 Catalpa Crescent, Turramurra, NSW, 2074* |
| **Aŭstrio** | *AEI, Grete Breunlich, Stoesslgasse 2/8, A-1130 Wien* |
| **Belgio** | *Léon J. Hauregard, rue du Centenaire 147, B-4600 Liège-Chênée* |
| **Brazilo** | *Enivaldo Alves Silva, civila inĝeniero, CxP 04-0144, BR-70000 Brasília (DF)* |
| **Britio** | *Marjorie Flint, 3, Longcroft Park, Beverley, N. Humberside HU17 7DY* |
| **Bulgario** | *Ljubomir Miĥajlov, str. Valentin Andreev 41, BG-1619 Sofia* |
| **Ĉeĥoslovakio** | *Jiří Laube, Alej RA 811, CS-413 01 Roudnice n. L.* |
| **Danlandio** | *Paul E. Kustaanheimo, DIA-E, 451, Danmarks Tekniske Hǿjskole, DK-2800 Lyngby* |
| **Finnlando** | *M. Rekunen, Kautiala, SF-36200 Kangasala* |
| **Francio** | *Féodor Jelenc, 97, rue A. Fradin, F-86100 Châtellerault* |
| **F.R. Germanio** | *Gerhard Kalckhoff, Schuckertstr. 14/XI, D-8000 München 70* |
| **Hispanio** | *Johano Guiñón C/ Wilfredo 6-3°-2a, Barcelona 1* |
| **Hungario** | *János Sárközi, Cserje u. 35, H-2600 Vác* |
| **Italio** | «Edistudio», *cas. post. 213, I-56100 Pisa* — pĉk 12230561 |
| **Japanio** | *S. Kawamura, 427-7 Kinasityô Huzii, Takamatu, 760* |
| **Jugoslavio** | *A. Jakupović, Filipa Višnjića 39, YU-11080 Zemun.* |
| **Meksikio** | *Héctor Vázquez, Avenida 7 No 267, México, 13, D.F.* |
| **Nederlando** | *J. O. de Kat, Kraaienlaan 3, NL-2566 RA Den Haag* |
| **Norvegio** | *Carl Stǿp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, N-Oslo 2* |
| **Novzelando** | *C. J. Adcock, 174 Oriental Parade, NZ-Wellington 1* |
| **Pollando** | *K. Ostrowski, ul. Lilli Wenedy 11/49, PL-308-33 Kraków* |
| **Portugalio** | *Portugala E-A, R. Dr. João Couto, 6 R/C.-A, Lisboa 4* |
| **Rumanio** | *Ing. Dorin Hehn* |
| **Sovetio** | *B. V. Tokarev, Ŝirokaja 16, kv. 200, SU-129224 Moskva* |
| **Svedio** | *Jan Setréus, Länsmansgatan 1, S-570 80 Virserum* |
| **Svisio** | *Rudi Hauger, Ringstrasse 13, CH-8172 Niederglatt* |
| **Usono** | *Ken Thomson, P.O. Box 663, Houston, TX 77001* |
| **Venezuelo** | *Juan Eduardo Bachrich* |



for la pasia kaj kelkfoje drama pasinto; for, eĉ, la nomo kiu estis la ŝia ĝis tiu momento: *Marie de Nevers.* Ŝi estos, de nun, reĝino *Ludwika.*

Ŝia nacieco? Itala, franca, pola?

Nu, la princoj *Gonzaga de Nevers* estis branĉo de la duka familio *Gonzaga*, kiu regis en Mantovo dum pluraj jarcentoj. Pro heredaĵo kaj pro dotoj de geedziĝoj, inter 1549 kaj 1565, formiĝis posedaĵo en Francio, kiu entenis, interalie, la teritoriojn de *Nevers*, de *Rethel* kaj de *Mayenne*. En 1599, la heredanto de tiuj ĉi bienoj, *Charles de Nevers*, edziĝis al *Catherine de Lorraine*, kaj naskiĝis al ili ses gefiloj, sinsekve *François, Charles, Ferdinand* (la tri viraj) kaj *Marie Louise Anne*, kaj *Benoîte* (la tri inaj).

*Marie-Louise,* pole *Maria Ludwika,* naskiĝis en 1611, en *Nevers*. Viveca, multinteresa inteligenteco, granda avido lerni, deziro plaĉi, elstari, *«une charmante verve italo-française»*, ĉarma vervo franc-itala, ŝin karakterizis, kaj onklino *Catherine Gonzaga*, dukino vidva de *Longueville*, ŝin ekŝatis, la gracian brunokulan knabineton, kiu iĝis orfa je patrino estante nur sepjara. Do la patro, *Charles de Nevers,* kiel ni jam diris, konfidis ŝian edukadon al sia fratino, al tiu ĉi vidva onklino, kiu ŝin jam amis.

Konataj estas la faktoj, kiuj portis la patron de *Marie Louise* al Mantovo. Tie, en la Duklando, la heredanto mankis. Nek Ferdinando la Unua, nek la frato Vincento havis filon. Ĉi lasta deziris rompi sian geedzecon kun la senfila kunulino kaj edziĝi al la nevino *Marie*, princino de *Monferrato*; sed al kuniĝo kun tiu ĉi princino, heredantino de la bela, riĉa, interesa de milita vidpunkto regiono, aspiris ankaŭ frato de nia *Marie Louis*, kiun *Charles de Nevers* jam sendis en Mantovon tiucele.

Konsideru, ke Mantovo estis, tiam, la militeca ŝlosilo de Italio por tiu potenco, kiu deziris la hegemonion en Italio kaj, tra tio, en Eŭropo; konsideru, ke *Monferrato* estis nepre necesa al la hispanoj, tiam posedantaj Milanon kaj superregantaj Ĝenovon, kaj, ke ankaŭ la dukoj de Savojo ne emis perdi siajn ŝancojn en tiu bela parto de Piemonto. Imagu do, kiaj luktoj okazadis ĉirkaŭ la diketa maneto de la princino de Monferrato. Kaj ŝi donis sian maneton, unu nokton, tra la kradoj de monaĥinejo, ĝuste al *Charles de Rethel*, do al frato de nia *Marie Louise.*

Terura eksplodo en la Eŭropaj kortegoj! Madrido invitas Vienon al pli strikta venĝa kunlaborado; Parizo subtenas la akiritajn rajtojn de Karloj patro kaj filo; kaj Karlo-patro atingas en Mantovo Karlon-filon plej rapide, fine de 1627, lasante en Francio la gefilojn, inter kiuj nian princinon *Marie*

*Louise* kaj ties du fratinojn.

*Marie Louise,* dekkvinjara, estis destinita al la pariza kortego; la du pli junaj fratinoj, *Anne* kaj *Benoîte,* al monaĥinejo. *Benoîte,* pli obeema kaj milda, tion akceptis; ja estis la kutimo de tiuj tempoj; sed *Anne,* pli vigla, envia pri la pli aĝa fratino, tion tute ne toleris: memoru pri la *Geltrude* de "La gefianĉoj"!

Tiom pli, ke por *Marie de Nevers* ŝajnis malfermiĝi brilega estonto: la geedziĝo, nek pli nek malpli!, kun la frato de la reĝo de Francio, nome *Gaston d'Orléans.*

Al *Gaston* la viva vojo aspektis luma kaj glora. Juna vidvo, frato de la fila reĝo de Francio, do eble mem estonta reĝo de Francio, svatata de la pariza knabinaro nobela kaj ne ... Li enamiĝis al la ĉarma, laŭdevene, italino, kiu, sub gardo de la onklino *Madame de Longueville,* vizitadis la palacon *Louvre.* Sed la reĝino-patrino, *Marie de Medici,* havis alian intencon. Ŝi ne volis kiel bofilinon nian *Marie Louise.* Ne! Inter la multegaj intrigoj kiujn la reĝino dum sia tuta vivo planis, restis al ŝi la memoro, ke la patro de *Marie Louise,* eĉ se li estis nun malproksime en Mantovo, sub minaco de milito por la heredaĵo ŝanceliĝanta, kiel ni rakontis, de la Duklando de Mantovo mem kaj de *Monferrato,* li, ĝuste li!, estis malamiko al ŝia favorato *Concini,* al ŝiaj subtenantoj la dukoj de *Guise*; kaj ankoraŭ, ke la grupo de la princoj de *Longueville, Soissons, Condé,* al kiu la knabino apartenis, estis malamika al ŝi, al la reĝino-vidvino de Francio! Ŝi deziris ja bofilon el sia propra familio: ŝi deziris, por *Gaston* kaj por Francio, novan reĝinon el la familio *de Medici,* sian parencinon *Marguerite de Medici*! Nek la reĝo Ludoviko la Dektria, nek lia edzino *Anna* de Aŭstrio, nek la jam potenca ministro kardinalo *de Richelieu* tamen volis trian sperton pri reĝino el la familio *de Medici*: sufiĉis *Catherine* kaj *Marie,* kaj eĉ estis tro ...!

Jen do nia princino kuntirata inter la tri grupoj: *Gaston d'Orléans,* kiu rondiras kun la mieno de pasia amanto; *Marie de Medici,* kiu ŝin vidas kiel fumon en la okuloj; la reĝo kaj *Richelieu,* kiuj, kvankam ne entuziasmaj pri ŝi, ŝin preferis al *Marguerite de Medici.*

Ŝia patro, *Charles de Nevers,* luktadis dum tiu tempo kontraŭ la premoj de Hispanio, la Imperio kaj Savojo. Kaj jam la lukto fariĝis milito. La hispanoj kun la duko de Savojo jam estis sieĝantaj *Casale* en *Monferrato,* kaj la imperianoj jam kolektadis armeon, la faman armeon, kiun *Manzoni* tiel majstre priskribis, por ataki Mantovon. La francoj subtenis lin ja; sed ili havis siajn proprajn ĝenojn kun la interna milito: *Richelieu* sieĝadis *La Rochelle,* la fortikaĵon de la hugenotoj.



Al *Charles* urĝis, urĝegis ricevi helpon de la francoj; sed la reĝino-vidvino de Francio malhelpadis ĝin: dum daŭros la amindumo inter *Gaston* kaj *Marie,* nenia helpo al la patro de ĉi-lasta! *Charles* inter la du malbonoj, estis devigita akcepti la malpli grandan: rezignon pri la eventuala geedziĝo de *Marie* kun la heredonto de la trono de Francio, por havi militan helpon. Nu, la filino venu al Mantovo; poste oni vidos ... Kaj, kun la filino venu al la ŝanceliĝanta duklando de Mantovo la necesa helpo de la francaj armiloj...
Sed ... venis nek la unua, nek la dua.

*Gaston,* ricevinte la komandon super la trupoj kolektitaj por liberigi *Casale* de la sieĝo, ja foriris, deklarante, ke li iras helpi "sian italan bopatron", *Marie,* akompanate de la onklino *Longueville,* ja foriris por atingi sian patron; sed jen!, *Gaston* perdas la komandon, kiun alprenas persone la reĝo mem; kaj la princino kaj la onklino, tute neatendite, estas kaptitaj de la reĝino-vidvino. Kial? Ĉar *Gaston,* tuj kiam li eksciis, ke oni resendas al Italio la amatinon, kuris survojen al la du vojaĝantinoj por forpreni *Marie* kaj edzinigi ŝin sekrete. Tiaj aferoj ne povas esti preparataj kaŝe: do la timiga reĝino-vidvino kontraŭpreparis la manovron: tri kaleŝoj kaj ducent — jes, ducent! — soldatoj, kaj jen la du kompatinduloj en malliberejo!

Vi imagu la koleron de *Gaston,* la indignon de *Charles de Nevers,* la ĝojon de la malica reĝino-vidvino, la embarason de *Richelieu* kaj de la reĝo Ludoviko la Dektria..., kaj la petoladojn de la tuta Parizo.

Intertempe la "landoskneĥtoj" (germanaj dungsoldatoj) invadas Italion. Unua sieĝo; dua sieĝo de Mantovo. Falo de la urbo, la 18-an de julio 1630. Prirabado de la urbo. Teruraĵoj, mortigoj, pesto.

Traktato de Ratisbono. Traktato de *Cherasco.* En 1631, *Charles Gonzaga de Nevers* estas rekonita Duko de Mantovo kaj de *Monferrato.* Sed, je kia prezo! Unu filo mortinta pro la milito; unu filo humiligita kaj malliberigita; packondiĉoj, kiuj metas lin fronte al daŭra ĉantaĝo fare de Francio, al kiu ili lin ligas; la tria filo, postnelonge, mortas en *Casale,* senhava; la pene akiritaj ŝtatoj, ruinigitaj, en dolorigaj kondiĉoj. Pesto kaj mizero ĉie.

*Marie* liberigita "kun la pardonpetoj de ŝia Reĝina Moŝto", pasigas nun siajn tagojn en la abatejo de *Avenay,* kies abatino estas la pli juna fratino, dektrijara, *Benoîte.* Kiel funkcias abatejo kun dektrijara abatino, ĉarmeta kaj kun nenia deziro putri en monaĥinejo, kaj kun ties fratino amata de la

frato de la reĝo? Vi bone povas imagi tion.

Kaj ankaŭ vi povas imagi, ke la tria fratino, *Anne*, tute ne volas resti, siavice, en monaĥinejo, kien la patro estis metinta ŝin. La tri junulinoj, kvankam tre divers-ecaj, kunligas sin. *Anne* deklaras: *"Dieu ne m'a point encore touché le cour d'être religieuse!"* (Dio ankoraŭ ne tuŝis al mi la koron por esti monaĥino). *Benoîte* protestas: *"Je suis resolue de sortir et de suivre la Princesse Marie"* (Mi decidis eliri kaj sekvi princinon *Marie*). *Marie* pretendas, ke la patro donu al ŝi la regadon super la francaj teirtorioj: "Mi estas dudekunujara, mi do estu mem la dukino de *Neves*!".

Kion kontraŭ la tri koboldinoj?

Nu: *Marie* sukcesas persvadi *Benoîte* fariĝi monaĥino; ŝi ricevos 1200 francajn funtojn jare, ŝi povos bone amuziĝi eĉ en monaĥinejo; kia skandalo, se ŝi elirus! La kompatinda fratineto do restos en *Avenay* kaj tie mortos post ne multaj jaroj.

*Anne* eliras el sia abatejo. Ŝi ankoraŭ ne estis elfarinta la religiajn votojn. Kaj kia estos poste la vivo de *Anne*, tio meritos tute apartan ĉapitron.

*Marie* mem iras al *Nevers* kiel regantino. Ŝia karaktero riĉiĝis per nova nuanco. Ĝis nun ŝi estis saĝa, pasiva, obeema; ŝi permesis, ke ŝia beleco estu la retenilo aŭ la puŝilo por politikaj aferoj. *Gaston*? *Gaston* nun amindumas alian princinon: temas pri unu lorena princino, kies frato helpas lin en liaj kontraŭstaroj al la franca kortego. *Gaston* havas siajn ambiciojn. Nu, kaj ŝi havos la sian. Oni ne kredis ŝin digna je la frato de reĝo? Morgaŭ ŝi venĝos sin fariĝante reĝino.

Cetere, en 1635, la reĝo Ladislao de Pollando, serĉas edzinon en Francio...

Cetere, en 1633, evidentiĝis, ke *Gaston* edzinigis sekrete la lorenaninon...

En 1637 mortas, preskaŭ samtempe, *Charles de Nevers*, duko de Mantovo, kaj lia fratino, la dukino de *Longueville*.

Jen nia *Marie* tute libera: dukino de *Nevers*, laŭ rekono de la franca reĝo. Sed la testamento de la patro tekstas alie: universala heredanto estas la nepo, princideto *Charles*, la lasta vira burĝono de la familio Gonzaga, la filo de tiu *Charles de Rethel*, frato de nia *Marie*, kies geedziĝo estis la komenca punkto de la milito por la heredaĵo de *Monferrato* kaj Mantovo. Do, kion elpensas nia juna politikistino? Ŝi pretendas la kronojn tiel de *Nevers*, kiel de *Monferrato*, kiel de Mantovo. Ne multe, ĉu ne? Ja ŝi estis preskaŭ fariĝinta heredantino de la franca krono, kiam *Gaston d'Orléans* svatis ŝin ... Ja ŝi estis svatita ankaŭ de la reĝo de Pollando ... Ja nuntempe (1639) venas de Pollando nova propono, flanke de la frato de reĝo Ladislao ...



En la ampleksan politikan ludon envenas Francio kaj Hispanio, ambaŭ por ne perdi, respektive por reakiri, la ŝlosilojn de Italio: *Monferrato* kaj Mantovo. Jes kaj ne, kaj jes kaj ne ... Iom post iom evidentiĝas, ke nia *Marie de Nevers* havas grandegajn helpojn ĉe la pariza kortego. Kiu? Kiu?

La patro de la minacata princideto *Charles* informiĝas.

Nu ... temas pri junulo ... nobelo, sed el malalta rango ..., iu markizo *Henri d'Effiat de Cinq-Mars*. Tiu? Jes, tiu. Li estas la dorlotata preferato de Ludoviko la Dektria. Dudekjara, malriĉa, belega. Metita de *Richelieu* ĉe la reĝo por lin distri kaj por spioni. *"Le joujou du roi", Richelieu*. Frekventis li la faman "bluan salonon" de la palaco de *Madame de Rambouillet*, centro de la kulturo franca. Ankaŭ la pola princo, la frato de reĝo Ladislao la Kvara de Pollando, ĝin frekventadis. Ambaŭ amindumis la dukinon Marie, kies konduto ne estis nun tute senriproĉa. La bela junulo, aŭ la princo el Pollando *Henri* aŭ *Jan Kazimierz*? Fakto estas, ke *Jan Kazimierz* foriris, kaj *Henri* restis.

Ĉu amo? Ĉu amoro? Ĉu ambicio?

*Marie* ne estas riĉa, en tiu momento. La bienoj leĝe estas, kaj ne estas, ŝiaj: laŭ la permeso de Ludoviko la Dektria jes, sed laŭ la testamento de ŝia patro ne. Ŝi ludaĉas kaj perdas monon. Ŝi elspezaĉas. Ŝi vivas senpripense.

Li — *Henri* — ne havas monon. *Richelieu* diradas, ke li estas freneza, se li kuraĝas levi la rigardon ĝis la dukino de *Nevers*.

Do, li havigos monon — kaj potencon — al si. Kiel?

Li profitas je la favoro de sia alta protektanto, la reĝo, kaj fariĝas Granda Ŝildogardisto. Ŝi incitas lin, puŝas lin, kaj klopodas utiligi lin por havigi al si la disputatajn bienojn de la dukoj de *Nevers*, de Mantovo kaj *Monferrato*... kaj, kun ili, monrimedojn. Ŝi komencas esti premata de la kreditoroj.

En printempo 1641, *Henri de Cinq-Mars* havis tian potencon ĉe la reĝo, ke la malamikoj de *Richelieu* pensis, ke li estas taŭga por esti kontraŭmetata al la ĉionpova kardinalo. Komence de la posta jaro, 1642, la komploto ekformiĝas. Kontraŭ la kardinalo, kaj profitante je la malbona stato de la sano de la reĝo, sin unuigas *Cinq-Mars* kaj — vidu, vidu ... — *Gaston d'Orléans*, la frato de Ludoviko la Dektria, la iama svatanto de *Marie*. Kun ili estas *François de Thou* kaj *Louis de Fontrailles*, kaj la duko de *Bouillon*. Kaj Hispanio! La 13-an de marto 1642, interkonsento kun Hispanio estas subskri-

bita: helpo de 12000 soldatoj kaj 5000 ĉevaloj; la ribelo ekiros el la teroj de la duko de *Bouillon*, se tamen *Richelieu* ne estos mortigita de malsano aŭ de ponardo, aŭ se tamen la reĝo mem ne forpelos lin: al kio senprudente *Henri de Cinq-Mars* laboradis.

Sed, fulmotondro: ne atendite, la 11-an de junio 1642, *Henri* estas arestita. De la kardinalo? Ne. De la reĝo.

Kial?

La reĝo sentadis la mankon de sia ministro, malsana kaj malproksima; plie, *Gaston* lasis sin preni de timo; plie, la reĝino *Anne*, eksciinte, ne tenis la sekreton; plie kaj ne laste, la interkonsento subskribita kun la hispanoj estis en la manoj de *Richelieu*. Katastrofo. La komplotintoj estas enkarcerigitaj. Nur la senkuraĝa *Gaston* sukcesis eskapi, ĉion konfesante kaj ĵetante la kulpon sur *Henri de Cinq-Mars*.

Tial, la 12-an de septembro, sur la placo *des Terraux*, en la urbo *Lyon*, falis la kapoj de *Henri* kaj de lia amiko *De Thou*.

Ĉu *Marie* sciis pri la komploto kontraŭ *Richelieu*? La historiistoj diras, ĝenerale, ke jes. La polaj eĉ asertas, ke ŝi partoprenis. La francaj ne vidas ŝin kiel partoprenantinon. Ĉu tiu granda monbezono, al kiu ni aludis, ne estis la rezulto de filudado, de vivaĉado, sed estis ...; sed pruvojn ja mi ne havas. Pruvojn mi havas pri suspektegoj de *Richelieu* kontraŭ ŝi ..., sed ne estas ĉi tie la loko por ekzameni ilin: traserĉu ankaŭ vi, se vi volas, *"les archives du ministère des affaires étrangères" en Parizo: 808 de Soissons.*

Ŝiaj leteroj al *Henri* estis transdonotaj al la kardinalo. Kie estis la leteroj? Ĉu mil oraj moneroj efikos? ... Ne. Pli efikis la prudento en la neprudento de *Henri*, kiu estis bruliginta ĉion jam antaŭ la kapto. Aŭ pli efikis la amikeco al *Marie* de la nevino de *Richelieu*, *Madame de Combalet*, kaj de la lerta kaj bela domestrino de la palaco de *Rambouillet*, *Julie d'Angennes*.

*Richelieu* mortis.

Certe, en la granda pereo de la malfeliĉa pasio por *Henri de Cinq-Mars*, kiel ajn ludis en ĝi amo kaj ambicio, la princino riskis mem droni kaj perei. Estas do nature, ke, post ĉi pereo, el la ŝtormo ŝi rifuĝis en la solecan havenon de *Port-Royal*, la rigideca abatejo sub la gvidado de la abato de *St. Cyran* kaj de la regantino de la monaĥinejo, *Angélique Arnauld*?

*Port-Royal*, koncentrejo de soleculoj, de la animoj, kiuj profunde kredis kaj severece alrigardis la religion. Kiom da altaj spiritoj pasis tra ĝiaj pordegoj!



Ĝia influo longe daŭros en la animo de nia princino. Longe, longe, la tutan vivon, dum regado, dum luktado, dum venkoj kaj malvenkoj, en fora pola lando; ĉar abatino *Angélique* ĉiam korespondos kun ŝi, kaj ankaŭ sanktulo, *de Paul*, admiros ŝian piecon, kiam ŝi estos reĝino.

**Reĝino.**

*Wasa*, reĝo de Pollando de 1632, estis la vivanta pruvo ke, la familio *Wasa*, veninte de Svedio, ankoraŭ ne alklimatiĝis en la nova patrujo, sed sopiris la perditan tronon heredecan de Svedio. *Richelieu*, proponante al li la reakiron de Svedio kaj eĉ, por la pola krono, de la provinco Silezio, celis havi lin ĉe sia flanko en la granda milito tridekjara, kiu tiam flagradis tra Eŭropo. Signo de la alianco devis esti la edzinigo, flanke de la pola reĝo, de iu franca princino. Ni jam aludis al la intertraktadoj por doni al li la manon de *Marie de Nevers*.

La granda projekto de *Richelieu*, kiun daŭrigos *Mazzarino* kaj Ludoviko la Dekkvara, la Reĝo-Suno, estis la subpremo de la potenco de la habsburganoj: de la Imperio, do, kaj de Hispanio. Plaĉis do al *Richelieu* la perspektivo preni la Imperion inter la fortoj kunigitaj de Pollando kaj Francio: tute kiel, en la tempo de Karlo la Kvina, Francio baraktis inter la kunigitaj fortoj de Hispanio kaj de la Imperio. Tiam la Imperiestro personigis ambaŭ fortojn; kial do, nun, franc-devena reĝino en Pollando ne faru la samon? Kaj, se, profitante la fakton, ke la krono de Pollando estis ne heredece, sed laŭ elekto transdonata, kial tiu reĝino ne preparu la elekton de franca princo al la trono mem de Pollando?

Sed Ladislao flaris la intencojn de la kardinalo. En 1637, apogante sian politikon al la habsburga partio, li abrupte edzinigis *Cecilia Renata*, filinon de Ferdinando la Dua, la Imperiestro.

*Cecilia* estis bona, modesta, ŝparema, kaj donis al Ladislao unu fileton. Sed la dua fileto mortis naskiĝante, mortis kun ŝi.

Do Ladislao serĉis denove edzinon. Kaj ĉi-foje li renkontis, kiel ministron de Francio, *Mazzarino*.

Kiom da kandidatinoj! Kiom da intrigoj! *Mazzarino*, tamen, elektis kiel proponotan la princinon *Marie de Nevers*; kaj, ĉi-foje, la elekto havis multe pli da kialoj ol por *Richelieu*. Ĉirkaŭ *Marie*, tiam 34-jara, estis kuniĝantaj la nobeloj francaj, iam subpremataj de *Richelieu* kaj nun releviĝantaj kaj preparantaj la komedion de la *"Fronde"*, Alianco kun Pollando kaj *Marie* for,

kia bonŝanco!, notas historiisto. *Mazzarino* ĝin ne volis perdi.

Jen do nia *Marie*, edzino per prokuro al la kvindekjara dika, ne bela, malsaneta reĝo. La 5-an de novembro 1645 ŝi eniris la kapelon de la palaco *Louvre*, en blank-arĝenta vesto, al kiu la reĝino *Anne* de Francio mem surmetis la juvelojn de la franca krono, laŭ la kutimo por princaj geedziĝoj. Ĝojo, malvarma digneca ĝojo travideblis el ŝia sinteno. En dua vico, malantaŭ la eta reĝo Ludoviko la Dekkvara, staris *Gaston*, la perfidinto de ŝia amo kaj de ŝia ambicio, la perfidinto de ŝia pasio por iama juna senbiena nobelo kaj la kulpinto pro la hontiga morto de ĉi tiu ... Kiel brilis pro venĝo-ĝojo la okuloj de la nova reĝino de Pollando!

Fine de novembro ŝi foriris. Ŝi foriris kun sekvantaro de ĉarmulinoj, krietantaj, gajaj, certaj, ke ankaŭ por ili troviĝos bona edzo en la fora, malvarma lando, kiun ili tute ne konis. Kaj unu el ili ja fariĝis ankaŭ reĝino: *Marie de la Grange d'Arquien, Marysienka*, la edzino de *Jan Sobieski*, reĝo de Pollando. Tiam la etulino estis kvarjara: oni eĉ flustris, ke ŝi estas filino de la nova reĝino mem kaj ... kaj ... Sed kia geedziĝo estas sen flustroj? La gaja procesio trairas Eŭropon, cele al Gdansko, kie la vojaĝo estis haltigita. Kio okazis? Denove oni flustris, ke forpuŝita amindumanto rivelis al Ladislao la antaŭajn ampekojn de la edzino. Sed ne, la realo estas malpli fantazia: la doto ankoraŭ ne estis pagita. Kaj tiu nepago de la doto klarigas la malrapidemon de la reĝa edzo plenumi la edzecajn devojn: la novedzino restis ekster la reĝa ĉambro dum pluraj tagoj, je granda ĝojo de la polaj korteganoj, kiuj malplezure vidis la aŭstrian influon forigota de la influo franca. Fine, la maljuna, agema akompanantino de *Marie Louise* (la tutan nomon ŝi uzos en Pollando, kiel reĝino), la edzino de la marŝalo de *Guébriant*, sukcesis sendi al *Mazzarino* la finan venkan bultenon: *"j'ai tiré les rideaux de leur lit!"* (Mi fermis la kurtenojn de ilia lito).

Tiel fermiĝas ankaŭ la kurtenoj sur la ama parto de la vivo de *Marie Louise*. Nun komenciĝos la aga.

Kia estis Pollando tiam?

En jarcentoj, dum kiuj formiĝis la alcentrigitaj ŝtatoj de la moderna epoko, kaj samtempe la burĝaj tavoloj de tiuj ŝtatoj, Pollando iradis al la disperdiĝo de la reĝa centra povo. Kaj neniel oni vidis en tiu lando la formiĝon de burĝaro. En la 15-a jarcento la povo estas praktike en la manoj de la grandsinjoroj (*panowie*), kies decidoj estas submetataj al la aprobo de la nobelaro (*szlachta*); ĉiuj povoj estas ĉe la parlamento (*sejm*), al kiu venas la delegitoj, elektitaj en la parlamentetoj regionaj (*sejmiki*). La reĝo Henriko *de Valois*, elektita en 1573, ĵuras la "Henrikajn artikolojn", kiuj sankcias tion, kion la polaj nobeloj nomas "ora libereco" (*złota wolność*): sufiĉas eĉ unu nea voĉo por nuligi ĉian proponon de la reĝo; kaj, se la reĝo ne fidelas al la konstitucio, se li eĉ, rekte aŭ nerekte, serĉas por si heredonton — dum la krono estas elekta —, la subuloj estas liberigitaj de la devo obei lin. Tio nomiĝas "konfederacio", *"konfederacja"* kaj *"rokosz"*, ribelo leĝa. Ĉu ne anarĥio? Kaj, ĉirkaŭ Pollando ariĝas modernaj ŝtatoj, unuecaj, absolutaj, avidaj. Tiu anaĥronisma konstitucio, kiu kuraĝigis la serĉadon de reĝo pere de elekto eĉ de fremdulo (tiom pli bone; ne estiĝos envioj!) kondukos al la fino de Pollando, al la fino de tiu libereco tiom obstine defendata.



Jen do la scenejo, sur kiu aperis nia reĝino.

Eble hereda monarĥio estus povinta, tiam, forsavi Pollandon el la dispeciĝo; tio ne estis afero por ununura homa vivo, fari el ĝi modernan ŝtaton, en argilan poton inter feraj potoj. Kaj *Maria Ludwika* dum siaj dekok jaroj da regado, ne sukcesis.

Denove ni demandas nin: ŝia nacieco? Itala, franca, pola? Se itala laŭ sango, se franca laŭ naskiĝo kaj eduko, nu tamen pola laŭ reĝeco. La polaj historiistoj, precipe la plej fruaj, estas malfavoraj al ŝi; por kelkaj ŝi estas la *"francuska żmija"*, la franca vipuro. Sed, kvankam ŝi agis laŭ la programo de *Mazzarino* kaj de la Reĝo-Suno, tion ŝi faris kun perfekta konscio, ke ŝia agado bonfaras al ŝia nuna lando; ke alianco kun Francio kaj subpreno de la habsburga potenco, kaj elektado de estonta reĝo dum la vivo de la reganta donos al Pollando la politikan daŭrecon, kiu estis al ĝi tiutempe ege necesa por pluvivi.

La historio, cetere, pravigis ŝin.

Tuj la diferencoj inter Ladislao kaj *Maria Ludovika* montriĝis klare. Li estis preparanta la militon kontraŭ la turkoj, esperante per tio, iom romantike, restarigi sian aŭtoritaton super la nobelaro tra sangoverŝado, tra venkoj kaj heroaĵoj, kaj ordigante samtempe la orientajn necertajn limojn. Ŝi pensis subfosi la neobeemon de la nobeloj, rekte kontraŭstarante ĝin; kaj ne plaĉis al ŝi, ke Ladislao postuladis la monon de ŝia doto por prepari tiun militon. Ankaŭ ne plaĉis al ŝi, ke *Mazzarino* donas al ŝi instrukciojn: li vidas bonvole la militon kontraŭ la turkoj, ĉu? Kaj ŝi kontraŭagu.

Ŝi tuj havis kontraŭ si la princon *Ossoliński*, grandan kancelieron de Pollando, kaj la venecian ambasadoron. Ambaŭ ja volis, pro diversaj kialoj, re-

starigi la aŭtoritaton de la reĝo; sed *Ossoliński* deziris kunligon kun la nobelaro, dum *Tiepolo* la veneciano, volis la militon kontraŭ la turkoj; la reĝino pensis pri rekta alfrontado al la nobeloj.

La malsameco estis en la rimedoj, kiel oni vidas; sed en la parlamento venkis la ideoj de *Maria Ludvika*, kiu tuj informis *Mazzarino* en Francio, lin lasante kun gapa buŝo: "En du horoj mi havigis al mi ĉiujn voĉojn. La milito kontraŭ la turkoj ne okazos".

Tamen la postsekvoj ne estis tiel facilaj. La kozakoj, jam kolektiĝintaj sub gvidado de *Bohdan Chmielnicki*, restis seniluziigitaj pro la rezigno pri la milito. Ili devos daŭrigi la pezan kamparan laboron por la nobelaj mastroj; nenia rabado, nenia gajno, nenia ŝanĝo... Ili ribelis.

Ladislao estis en tiu momento en granda senkuraĝiĝo: la fileto kiun *Cecilia Renata*, la aŭstria edzino, estis doninta al li, mortis pro enterito. Malgajaj infanecoj de la iamaj princidetoj, sen amo, sen ludado, en la grandaj salonoj duonmallumaj de la kasteloj, kie ĉio kontribuas al malgajigo de la knabeta spirito: la ombroj de la altegaj plafonoj, la senfinaj misteroj de sennombraj ĉambregoj, unu post la alia, unu post la alia... Kompatindaj infanecoj sen suno ... Kaj la eta Zygmunt reiris al sia patrino mortinta, en aŭgusta vespero de 1647. Sen li kiel ebla heredonto, Ladislao ne plu trovis celon al sia politiko por restarigo de reĝa aŭtoritato; kaj, post eĉ ne unu jaro, ankaŭ li mortis, tre verŝajne pro pleŭrito.

La kozaka ribelo furiozis tra Ukrainio: ĉe *Piławce* la pola armeo ricevis unu el la plej teruraj batoj de sia tuta historio. Kaj la tataroj kaj la ribelantaj kozakoj atingis Lvovon kaj terure prirabis ĝin. Kaj la lando estis sen reĝo!

Ne sen lukto la frato de la reĝo, *Jan Kazimierr*, estis elektita. Li rezignas pri la kardinaleco, kiun li jam havis, kaj petas edziĝon kun *Maria Ludvika*, la reĝino-vidvino. Ĉu li memoris pri la varmaj vesperoj de la Palaco de *Rambouillet*? Pri sia amindumo al la tiama belulino? Politiko kaj amo preskaŭ neniam iras samtakte...

La juneco de *Jan Kazimiere* estis estinta tre malkvieta: nutro fantazia, iom stranga, tre arda, gardis li de tiam nur unu precipan karakteron: la nefirmecon. «Unu el tiuj interesaj karakteroj sen karaktero», oni difinis lin: militisto, kaptito, jezuito, kardinalo, reĝo, edzo de bofratina reĝino kaj, post ties morto, edzo de pariza lavistino, li daŭre ŝanĝis direkton kaj decidojn. La geedziĝo kun la bofratino estas la lasta akto de lia agado; poste, finite: li lasas la bridojn de la ŝtato al sia edzino, kiu nenion pli bonan postulis!



La pajla reĝo edziniĝas feran reĝinon.

Ĉu pajla reĝo povos realvoki iom de sia malnova juneca ardo por venki la ribelon de la kozakoj kaj la tataroj? Ne. Johano Kazimiro subiras, ĉe *Zborów*, al alia malvenko, preskaŭ terura kiel tiu de *Piławce*. Sed tiam la reĝo malĉeestis, dum nun ...

La parlamento sankcias la pacon de *Zborówo*; kion ĝi estus povinta fari? *Maria Luduvika* ne multe aperas tiutempe sur la scenejo tiel sanga kaj malgaja. La historiistoj ne multe klarigas la kialon. Ŝajnas, ke laŭ ili naski filinon kaj poste ŝin perdi vivbruligita dum oni atendas la duan infanon, kaj naski ĉi tiun duan, filon, kaj perdi ankaŭ lin, nu, tio laŭ ili estas bagatelaĵo. Certe, la ĉagreno pro morto de infano — ĉi-okaze de infanoj — estas nur guto en la maro tempesta de la politiko, de la historio. Kaj tamen el tiaj gutoj fariĝas niaj homaj vivoj. Eble la Historio ne rilatas al ni homoj. Eble ĝi estas io tute alia.

"*Sans enfants, que m'importe le reste?*" kaj "*N'ayant point d'enfants, je ne me soucie cassy de rien*" (Sen infanoj, kiel gravas la cetero? — Ne havante infanojn, mi ne faras al mi zorgojn pri io ajn), skribos post kvar jaroj la kompatinda patrino al sia amikino *Madame de Choisy*.

Printempo 1651. Johano Kazimiro planas novan militon, interkonsente kun *Maria Ludovika*. Ŝi eĉ akompanas lin ĝis la soldata tendaro: temas, ĉi-foje, ne pri krucmilito kontraŭ la turkoj, sed pri kontraŭstaro al la kozakoj, kies ribelo ne tute finiĝis. La reĝo kaj lia hetmano, t.e. lia generalo *Mikolaj Potocki*, kampis en *Beresteczko*, ĉe la ruten-volinia limo. Jen la ribeluloj aperas; jen la avangardo, poste la tutaĵo de ilia militistaro. Estas varma junia tago; la rikoltoj flavas sur la kampoj, dum la homoj batalas. La homoj batalas dum tri tagoj; kaj fine, la blanka aglo, la flago de Pollando, estas venkanta. Jam la ribeluloj forkuras; la reĝo volas postsekvi ilin, sed lin malhelpas la nobelaro, la kutima "*szlachta*", kiu posedas la kampojn. "Jam ni estas en julio! Ni devas falĉi la grenon, rikolti la fojnon... Ne, ne, ni reiru." Do ili reiras ĝis *Lvovo* kaj ĵetas al la vento la fruktojn de la venko por ne perdi la fruktojn de la kampoj. Tiamaniere, la kozakoj povas reorganiziĝi kaj, iom poste, devigi la polojn al nefavoraj pac-kondiĉoj. Iom pli poste ankoraŭ, tria ribelo, ĉi-foje kun la helpo de la rusoj: ĝis la paco de 1667, nenial la poloj havos trankvilon ĉe tiu limo orienta.

Sed la plej grava malbono estis ankoraŭ okazonta, nome: la invado pollanden fare de la svedoj. Kaŭzo proksima: la perfido de forpelita kortegano

*Radziejowski*; malproksimaj kaŭzoj multe pli gravaj estas la jenaj.

Svedio projektis la alproprigon de la parto de Pollando, kiu frontis Baltan maron; tion ĝi bezonis por malpliigi la potencon de la danoj; dume, Ladislao la Kvara revis pli plivastigo de la influo de sia lando ĝuste sur la gruzaj ondoj de Balta maro. Kaj la familio *Wasa*, el kiu la poloj elektis al si tri reĝojn (Sigismondo, lia filo Ladislao, kaj ties frato Johano Kazimiro), pretendis, ne tro senrajte, la tronon ankaŭ de Svedio, kie la monarĥio ne estis elekta, kiel en Pollando, sed hereda.

Reĝino *Maria Ludovika* suspektis pri la planoj de Svedio. jen kial ŝi laboris diplomatie, por ke la forpelita kortegano *Radziejowski* ne restu longtempe en Svedio, sed revenu plej baldaŭ, sen daŭrigi siajn incitojn al reĝino *Kerstin* de Svedio kaj al ŝia postsekvanto, Karlo Gustavo, por invado en Pollandon. Ŝi ne sukcesis: do ŝi eklaboris en alia direkto, por transformi la interpacon kun Svedio en daŭran finan pacon. Sed jam estis tro malfrue: la svedoj invadis Pollandon en julio 1653.

Teruraĵoj, priraboj, kruelaĵoj, kiel kaj eĉ pli ol en la tempo de la kozakaj ribeloj. Oni disŝiris la vivantojn kaj la mortintojn, esperante, ke ili englutis juvelojn aŭ oron por savi ĝin de la prirabado. Oni pendigis, torturis, sufokis, perfortis.

*Maria Ludovika* kaj Johano Kazimiro enfermiĝas en Krakovo, forlasinte Varsovion al la invadintoj. Sed ankaŭ Krakovo estas en tuja danĝer: la gereĝoj forkuras al Silezio; dume, multaj el la polaj ĉefoj pasas al la malamika tendaro. Kaj jen estis perfidoj! En bona fido ili aklamis Karlon Gustavon reĝo de Pollano, kaj li kunvokis la parlamenton en Varsovion por esti leĝe elektita reĝo de Pollando.

Kion fari? El la ekzilo de *Glogow Maria Ludovika* ekmovas la restarigan agadon. Ŝiaj kurieroj trairas Eŭropon. Estas ŝi (ne la edzo), kiu alvokas la imperiestron kaj la francojn kaj la princon elektiston de Brandenburgo. Estas ŝi, kiu respondas al la senatanoj, kiuj proponas la abdikon de Johano Kazimiro favore al la venkinto: "Se la poloj konas iun, kiu povus ilin savi, la reĝo estas preta redoni al la ŝtato, kion li ricevis de ĝi. Sed estas pli bone ne vivi, ol vivi dank' al la favoroj de la malamiko: por mi, mi preferas ĉiaman ekzilejon en iu fremda angulo de la mondo".

*Mazzarino* ne sendis la petitan helpon. Kompreneble! Li celis teni la Germanan Imperion inter Francio kaj potenca Pollando, kiel inter la branĉoj de tenajlo: de nun en Pollando regas Karlo Gustavo; nu, li, *Mazzarino*, estos



favora al Karlo Gustavo. Tamen... la reĝino de Pollando nun intertraktas kun la Imperiestro... Ĉu Vieno, kaj ne Parizo, konkludos kiel peranto la pacon inter Pollando kaj Svedio? Kaj tiu reĝino ne longe restas sur la ekzila tero de Silezio: jen, ŝi eliras mem el ĝi; ŝi kuniĝas al la hetmano *Czarniecki*; ŝi vivas inter la militistoj; ŝi konsilas, kuraĝigas, vigligas, ĝis ŝi reatingas la ĉefurbon, Varsovion. "*Vous ne me reconnaîtrez pas, je suis devenue vaillante*" (Vi ne rekonus min, mi iĝis kuraĝulino), ŝi skribas al la franca amikino *Madame de Choisy*, "*Je me divertis à reprendre des villes aux Suédois*" (mi amuziĝis reprenante urbojn for de la svedoj).

Varsovio tamen estas en grava danĝero: ĝi restas libera nur tri tagojn, kaj Johano Kazimiro petegas ŝin, ke ŝi forkuru kun li duan fojon; sed ŝi respondas: "Se la reĝo forlasos Varsovion dum li ankoraŭ havas soldatojn, do mi restos por defendi ĝin kun miaj senarmaj tri akompanantinoj" (tio estis entute ŝia sekvantaro de Silezio al Varsovio).

La batalo ardas. Ŝi ne rezistas al la senpacienco. Ŝi eliras, kaj tute sola ŝi kuras al la urbofortikaĵoj; kio okazas? La poloj cedas ... la poloj ne kontraŭstaras... Ŝi prenas sian ĉevalon, alligas ĝin kun helpo de soldato al kanono, trenas la armilon al pli taŭga loko, kaj mem direktas la frapojn al la postsekvantaj svedoj. La nokto falas; ŝi ne foriras; ŝi manĝas inter la soldaoj, sidante sur tamburo, kun militista mantelo sur la ŝultroj.

Malgraŭ ŝia kuraĝa konduto, la svedoj prenas la urbon, kaj ŝi apenaŭ ĝustatempe forkuras. Ŝi trairas la landon, ĉiam helpante, kie ŝi povas, rifuzante savpermeson de la svedoj, kaj intense klopodante pro helpotraktato kun la Imperiestro: "*La Pologne se perd, la Roi est à la frontière... Si les Français m'avaient secouru, je les aimerais, mais, étant amis des Suédois, je suis leur ennemie*" (Pollando perdiĝas, la Reĝo estas ĉe la limo. Se la francoj estus helpintaj min, mi amus ilin, sed, ĉar ili amikas al la svedoj, mi estas ilia malamiko). Tiel fine ŝi sukcesas: la imperianoj akceptas, subskribas la aliancon, sendas la generalon Rajmondon *Montecucoli*, kiu liberigas Krakovon, kaj la milito evoluas favore al la poloj: la milito kaj la senhaltaj traktadoj por paco. La paco subskribiĝis en la monaĥejo de *Oliwa* en decembro 1659: Pollando, por la momento, estas savita.

Savita; sed ne sekura. *Maria Ludovika* komprenas, ke la regadsistemo de Pollando ne sufiĉas por savi ĝin daŭre. Nenia aŭtoritato en lando sen certaj, defendeblaj limoj, kaj en tempo, kiam ĉiuj eŭropaj ŝtatoj donis al si centran organizon, centran povon; tio ne permesos al Pollando plu vivi. La poloj,

kiuj serĉis reĝon fremdan, por ke neniu el ili superregu la samlandanojn, ja tre ofte malbonfaris al sia patrujo. Ĵus ĝi sangegis pro tio, ke sur ĝia trono estas sveddevena reĝo; ĝi estas kuntrenata de unu politiko al alia, pro ŝanĝo de la fremdulo kiu iĝas, laŭvice, pola reĝo...

Se almenaŭ oni elektus la sekvontan reĝon dum la vivo de la estanta reĝo... Eble, oni poste igos la monarĥion hereda; tio donos certan daŭron al la politika direktado. Eble oni, pli poste ankoraŭ, ordigos la landon kaj ebligos la formiĝon de burĝaro fortika, bonhava, rajtohava, kio ne ekzistas ĝis nun en la lando.

Por tio laboras *Maria Ludovika* post la paco de *Oliwa*.

Ŝia ideo renkontiĝas kun la intencoj de Ludoviko la Dekkvara.

Tuj post la paco, ŝi ŝarĝis du komisionojn studi la problemon de reformado de la parlamento; sed la regionaj parlamentoj opoziciis. Do ŝi turnis sin al la projekto elekti postsekvonton al la vivanta reĝo; kaj, plie, ŝi projektis edzigi lin al unu franca princino: al sia propra nevino, la filino de tiu *Anne*, kiu ne volis resti en la monaĥinejo kaj rivalis kun ŝi dum iliaj jaroj. Pro neklaraj kialoj, multe pli psiĥologiaj ol politikaj, *Maria Ludovika* sin ligis al tiu nekontata knabino kaj obstine volis fari el ŝi unu Reĝinon de Pollando. *Maria Ludovika* kaj Johano Kazimiro adoptos ŝin, kaj la reĝino per sia tuta koro ŝin alvokas: "Mia filino!". Ĉu eble rememoro pri la etulino unujara, kiu mortis en la varsovia reĝa palaco, bruligita en la incendio de sia lulilo? Ĉu rememoro pri la etulo, kiu vivis, gracila lilio, dum malmultaj monatoj kaj sekvis la fratineton al la ĉielo? *"Ma fille"*, mia filino... Kia sopiro sin kaŝis en tiu ĉi alvoko?

Por atingi la celon, *Maria* serĉas samtempe edzon al la nevino, kaj partianojn en la pola kortego. Por akiri partianojn, nur unu afero nepras: ĵeti al ili oron. Kaj ŝi tion faras.

"Koruptistino!", kriadas al ŝi la plejparto de la historiistoj. "Franca vipuro!", eĥas la pamfletoj. Sed ni devas memori, ke kion ni malŝatas nun, tiam oni ne malŝatis: en la 17-a jarcento la moralo estis alia; kaj la sendito de Ludoviko la Dekkvara povis tute senriproĉe prezenti al sia mastro la liston de la elspezoj: "Aĉetita *Czarniecki*, 12.000 funtoj; aĉetita *Morsztyn*, 4.000 funtoj; ...": sur tiu listo troviĝas la nomoj de la plej heroecaj kaj famaj poloj de la 17-a jarcento inklude la nacian heroon, *Jan Sobieski*.

Sed nur unu el la personaĵoj estis malfacile akirebla: la riĉa kaj influa Granda Marŝalo *Jerzy Lubomirski*. Li mem, je la komenco, ne malfavoris; sed li estis polo: li do timegis, ke la reĝino tuŝos la "oran liberecon" de la poloj kaj mem elektos la reĝ-postsekvonton. Kaj ankaŭ ke la reĝino favoros la aŭstrianojn...



Ne, la reĝino ne elektos por sia nevino edzon en Vieno. Ŝi starigas, kaŝe al *Mazzarino*, korespondadon kun unu sia iama admiranto el la tempoj de la palaco de *Rambouillet*: la princo de *Condé*, la venkinto de *Rocroi*. Lia filo edzinigu la princinon *Anne*, la nevinon de *Maria Ludovika*. *Mazzarino*, kiam li malkovras tiun intencon de la reĝino de Pollando, tamen ne estas malkontenta. Ĝuste ĉar la *Condé*-oj ne estas liaj partianoj, li ĝojus havi unu el ili ekster Francio... Do, oni laboru kune ĉe la polaj nobeloj, por ke ili akceptu kiel reĝon, jam antaŭ la morto de Johano Kazimiro, la princon de *Condé*, *Henri* dukon *d'Enghien*, kaj kiel reĝinon estontan la nevinon de la estanta, *Anne*.

En 1661, ĉio ŝajnas preta: eĉ la parolado, kiun Johano Kazimiro devos fari por proponi la elektadon de estonta reĝo. Li ĝin faris, dirante, ke, estante maljuna kaj sen filoj, li decidas doni al sia popolo la "permeson" elekti al si reĝon antaŭ lia propra morto. Sed la popolo ne ŝatis la proponon. *"Niema zgody"*, kriis unu el la reprezentantoj de la regionoj: "ne estas konsento". Kaj *"niema zgody, niema zgody"* tumultis la asembleo.

Nenio, do; oni laboris por nenio. Restis du faktoj: ke la "ora libereco" ankoraŭfoje restis netuŝita; kaj ke la oraj moneroj, disĵetitaj por tiu afero, mankis nun por pagi la stipendiojn al la militistaro. Jam de longe la soldatoj ne ricevis pagon: do la reĝo ne plenumis sian devon; do ili — leĝe — ribelis. Memoru, ke la ribelo estis leĝa, se la reĝo preterlasis iun sian devon. Ĉu pagi la soldatojn ne estis lia devo? Do, la soldatoj "konfederaciis".

Kiu sin faros ĉefo de tiu ribelo?

La nekoruptebla Granda Marŝalo *Lubomirski*.

Kial? Ĉu do li komence ne favoris la planojn de la Reĝino? Kio mankis? Kio okazis? Ĉu la aŭstroj...? Ĉu la transilvanoj...? Ĉu la hungaroj...? Ne. Nur, *Lubomirski* estis polo, kaj kiel polo li defendegis pasie, esklude, la oran liberecon de la poloj. Ĝi estis ilia idolo. Eĉ se la idolo havas argilajn piedojn, kiuj ne subtenos ĝin, kiuj disfalos kaj trenos teren la oran statuon, teren, koten, al pereo. *Lubomirski* kuniĝis al la ribelantoj kaj gvidis ilin.

Dume, *Henri*, la duko *d'Enghien*, filo de la princo de *Condé*, kiel planite edzinigis la nevinon de *Maria Ludovika*, la junan, gracian princinon *Anne de Witelsbach* (tio estis ŝia nomo).

*Lubomirski* plu gvidas la ribelon. Kaj do, por silentigi lian voĉon kaj haltigi lian agadon, *Maria Ludovika* kulpigas linue perfido kaj starigas tribunalon por juĝi lin: apartan, nelaŭleĝan tribunalon, kiu, kompreneble, kondamnis lin.

Li forkuris, rifuĝis al la Imperiestro. Kun soldatoj de la Imperio, kun mono kaj armiloj de la Imperio, li sin deklaris senkulpa kaj eniris Pollandon, reatingante la ribelantajn polajn soldatojn. Kompreneble, la reĝino deklaris lin "publika malamiko" kaj preparis la militon kontraŭ li. Ĉefo por la regula militistaro: la reĝo mem.

Kiu venkos?

Post longa sinserĉado, dum kiu, laŭ mia impreso, la du armeoj ne vere serĉis unu la alian, sed klopodis eskapi, la reĝo kaj *Lubomirski* batalis ĉe *Częstochowa*, la sanktejo plej fama de Pollando. De la supro de *"Jasna Góra"*, la fama statuo de la Nigra Virgulino rigardis la fratan batalon. *Lubomirski* venkis; kaj la impreso, en la tuta lando, estis grandega, preskaŭ superstiĉa. Post tio, mallonga interpaco dum la malvarmaj, mallongaj vintraj tagoj; kaj denove la interfrata milito, kaj denove malvenko de la reĝaj armiloj. Nova interpaco. Kaj plu...?

Neniu el la du interpaciĝantoj serioze pensis rezigni.

Kiu venkos do?

La Morto. La Morto prenis en siajn ostajn brakojn la Grandan Marŝalon, neatendite, en malvarma posttagmezo de januaro 1667.

*Maria Ludovika* esperis, tiam, kune kun la malproksima potenca Reĝo-Suno, ke la Morto malfermis por ŝi la vojon al la planita elektado de postsekvanto, kaj sekva firmigo de la reĝa povo en Pollando kaj reordigo de la lando. Sed la parlamento en 1667 formale malpermesis al la gereĝoj okupiĝi plu pri tiu plano, kaj unu el la delegitoj eĉ kriis fronte al ili: "Senutile estas ĉi tie diskuti, se la asembleo estas sklavo de la decidoj de la Reĝino!" "Mensogulo", kriis responde Johano Kazimiro. "Ne mensogulo, sed elektisto de reĝoj kaj forpelanto de tiranoj mi estas", fiere respondis la delegito.

Eksciinte la decidon de la parlamento, Ludoviko la Dekkvara alprenis preskaŭ frenezan rezolucion: sendi la princon *de Condé* mem kun 10.000 soldatoj perforte pollanden; tio sekurigos la elekton de postsekvanto laŭ la volo lia kaj tiu de la reĝino.

Sed — denove — venkis la Morto. *Maria Ludovika* mortis frumatene, la 10-an de majo 1667. "Do, mi devas morti", estis ŝiaj lastaj vortoj. Tiel disperdiĝis en la vento planoj, intrigoj, projektoj kaj politiko de *Maria Ludovika*. La plifortigo de la centra povo ne okazis; kaj Pollando falos, dispecigita inter siaj malamikoj, en la sekvonta jarcento, perdante ne nur la oran liberecon, sed la sendependecon mem.



*"Et dissipatae sunt omnes cogitationes eius"*, diris la episkopo *Wydźga* super ŝia ĉerko.

Mi supreniris penseme, en malvarma neĝa decembra mateno, la krutan vojon al la katedralo de *Wawel*, kie dormas la polaj reĝoj.

Mi supreniris penseme, kun la imagata eĥo de la hufobatoj de ok nigraj ĉevaloj, kiuj trenis la funebran ĉaron de *Maria Ludovika* laŭ la ŝtonpavimita krutaĵo. Neĝomakuloj en la malcerta lumo de la vintra mateno palgrizis laŭ la vojo.

Kaj mi troviĝis en la kripto de *Wawel*, serĉante pri *Maria Ludovika*. Ŝia ĉerko el bronzo nigris severece, preskaŭ timige; kaj, ĉe ĝi, malgranda ĉerketo, la tombo de ŝia malgranda filo.

Reĝino, diru: ĉu ne estas enfermita en tiu ĉerketo via vera virina destino?

**Amori, matrimoni e politica di una principessa del Seicento**

*Nata a Nevers nel 1611, Maria Ludovica Gonzaga apparteneva al ramo francese della famiglia; suo padre, Carlo Gonzaga di Nevers, all'estinguersi della linea dei Duchi di Mantova, ne era rimasto il contrastatissimo erede: sono note le vicende della guerra di successione per il possesso di Mantova e del Monferrato, terminata con il riconoscimento di lui come Duca, ma a prezzo di terribili rovine.*

*Maria Ludovica era stata educata alla Corte di Parigi. Di lei si innamorò il fratello del Re, Gastone di Orléans, ma i due giovani ebbero contraria la Regina madre, l'intrigante Maria de Medici, tepidamente favorevoli Luigi XIII e Richelieu. Maria de Medici arrivò a fare arrestare la principessa, la quale divenne, involontariamente, una delle pedine del gioco politico nella lotta tra Francia e Spagna per il predominio in Italia, di cui l'accennata guerra di successione fu uno dei principali episodi. Liberata, Maria Ludovica fu per un certo periodo nelmonastero di Avenay, poi rientrò come Duchessa a Nevers. Passato Gastone d'Orléans ad altre nozze, Maria Ludovica si invaghì di Enrico d'Effiat di Cinq-Mars, che ella forse spinse alla congiura contro Richelieu (cui non era estranea la Spagna), terminata con la condanna a morte del giovane. La principessa si ritirò a Port-Royal, e questo soggiorno, ricco di fermenti spirituali, pose termine all'agitata giovinezza di Maria Ludovica.*

*A 34 anni, fu proposta come sposa dal Mazzarino (succeduto al Richelieu) al re di Polonia, Ladislao IV Wasa, coll'intento di alleare così Francia e Polonia, e chiudere l'Impero degli Absburgo fra i due regni, come nella fase precedente, gli Absburgo avevano tentato di chiudere la Francia tra Spagna e Impero. Una regina di origine francese avrebbe, poi, potuto preparare l'assunzione di un principe francese alla corona (elettiva) di Polonia. Il matrimonio fu celebrato per procura alla fine del 1645, ma la consumazione ne venne effettuata solo più tardi, quando fu pagata la dote.*

*Maria Ludovica si adoperò ad evitare la guerra contro i Turchi, e a fronteggiare la conseguente ribellione dei Cosacchi e dei Tatari, durante la quale venna a morte Ladislao IV, e che fu arginata, non conclusa, con la svantaggiosa pace di Zborow. Nel frattempo, le erano nati complessivamente da Ladislao due figli, che morirono di lí a poco, uno dopo l'altro in modo tragico.*

*Maria Ludovica sposò allora il cognato, Giovanni Casimiro, che lasciò a lei le redini dello Stato e i maneggi politici. La regina si trovò a fronteggiare l'invasione della Polonia da parte di Carlo Gustavo di Svezia; nel Paese invaso, diede prova di coraggio veramente virile e riuscí a salvare le sorti della Polonia (pace di Oliwa, 1659).*

*Da allora, ella tese a rendere ereditario il trono polacco, troppo sovente offerto a principi stranieri (come lo erano stati gli stessi Wasa): il primo passo fu il tentativo di ottenere l'elezione di un successore vivendo il re. La sua scelta cadde sul figlio del gran Condé, sposo alla nipote di lei, Anna. Dalla Francia, Luigi XIV caldeggiava il progetto e lo finanziava. Ma il Gran Maresciallo Lubomirski trascinò alla ribellione l'esercito e la nobiltà, vedendo nella elezione progettata un attentato alla "aurea libertà" dei Polacchi. Di qui una lunga guerra interna, in cui la vittoria fu della Morte: i due principali contendenti, Lubomirski e la regina, scomparvero, a poca distanza l'una dall'altro, nel 1667. La Polonia non poté diventare uno stato accentrato sul modello degli altri Paesi europei e perderà, nel secolo successivo, non solo la sua "aurea liberà", ma la sua indipendenza stessa.*

**Oficiala Organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)**

Direttore responsabile: Aldo de' Giorgi
Registrazione n. 2 del 3.2.82 presso il Tribunale di Pisa
Stampato nel novembre 1982 — Presita en novembro 1982

## Enhavo

**N-ro 2 (138): sociscienca kajero**

Kapitalgajnoj de loĝdomoj en Svedio
(*B. Sandelin*) ........ p. 41
Amo, geedziĝoj kaj politiko de princino en la 17-a jarcento
(*C.C. Guglielminetti*) ........ p. 58